– Aside from being Chief Delegate, while a Committeeman I served six years as Chairman of the Nominating Committee, which seeks out appropriate candidates for the top offices of UEA. It is reported to be the toughest job in UEA. I am proud of the fact that during my tenure, UEA elected two non-European presidents: Lee Chong Yeong of Korea (second Asian president) and Keppel Enderby of Australia. Both served UEA well. I'm not quite sure why UEA honored me with the Honorary Member title – there were many others who did more than I did; but I was a faithful worker in the vineyards for many years, and I suppose that I must have gained a certain reputation among the other Committeemen. In any event, I am proud of the distinction, and of the Honorary Member distinction awarded to me by ELNA.

– Also your wife Lucy is a very active Esperantist. How did you meet? Are any other members of your family Esperantists?

– We'd need a whole new article or issue for me to fully answer this about Lusi. She has done a truly amazing thing in producing the 16-lesson video course *Esperanto – Pasporto al la tuta mondo*. She found the author, found the cast (all of whom worked without pay), found the perfect director

(Judy Montell), almost single-handedly raised the sum of over \$300,000 to make filming and production possible. She interlaced the filming with the classes at SFSU to provide a steady stream of extras. She pulled rabbits out of hats constantly. I'm truly proud of her. She now serves as a member of ELNA's Board of Directors, and as Committeeman A of UEA representing ELNA. And she's now completing the DVD version of *Pasporto*.

How did we meet? We've been married for 43 years now, but I still remember the first time I saw Lusi at a Democratic party after an election in Southern California. We were married shortly thereafter and have been teammates ever since. As to other family members, only my grandson Justin has seriously taken to Esperanto, although I sent several others to Esperanto courses including those at SFSU. (And talk about "edzperanto", Justin nearly married a beautiful Hungarian girl whom he met at the SFSU courses!)

– Thank you so much for the interview!

* Box 1129, El Cerrito CA 94530 or online at elna@esperanto-usa.org

Interviewed by Ĵenja Amis

Korespondi deziras

Saluton, geamikoj!
Mi estas Jimmy Mayal, mi loĝas en la urbo Jundiá, São Paulo, Brazilo. Antaŭnelonge mi komencis lerni Esperanton, kaj mi ŝategus amikiĝi kun vi. Mi volus lerni pli pri via bela lando kaj eble, kun via helpo, eĉ labori kaj loĝi tie. Mi ĉiam volas helpi al la popolo. Mi estas muzikisto kaj estimas ĉiujn volontulajn laborojn. Mi volas plibonigi la mondon por ĉiuj popoloj, tial mi trovis Esperanton, la manieron malgrandigi la distancon inter la popoloj kaj inter la klasoj, permesante la perfektan harmonion por la homaro. Mia adreso: Jimmy Mayal Costa. R. Prof.^a Joceny Villela Curado N 30/ Bairro V. Nami. 13206-320 Jundiá – SP, Brasil.

I wish to correspond with men and women from other countries. They must be at least 25 years old. Larry Lowe. 1159 Business 71, Columbus, Texas 78934.



With the cat Sabrina (both content)

Unufojulo en la 61-a IJK

(daŭrigo. Komenco sur p. 1)



Ĉe muzeo en Zakopane

Anderson "Nehundo" Mills

Kiam nia buso alvenis al la kongresejo, ĉio tre ĥaosis tie! Ne estis vicoj por la akceptado, sed estis hazarda homamaso kiu premiĝis ĉe la pordo por komenci la procezon. Feliĉe, ĉiuj tie estis tre ĝojaj, do ni konatiĝis, babilis, kaj malrapide alvenis ankaŭ nia vico por la akcepto. Antaŭ tiam mi ne komprenis kiel funkcias la loĝado, kaj mi aliĝis al la kongreso post la limdato – kaj la sola ebla varianto kiu restis estis "memzorganto". Mi malkovris ke mi dormos sur la planko en komuna ĉambro, en mia dormosako, kaj aĉetos manĝaĵojn en la proksimaj manĝaĵvendejo kaj restoracioj. Tio tre facilis ĉar mi akiris ankaŭ "dumkongresan nepinon", Agnieška-n, kiu estas tre helpema polino.

Tiun vesperon okazis kaj la

Solena Malfermo kaj la Interkona Vespero. 600 junanimuloj povis fari grandan bruon, kaj ni faris tion denove kaj denove por la "feliĉindaĵoj" kiuj okazis dum la Solena Malfermo – ekzemple, kiam la direktoro de la Tatra Nacia Parko diris siajn salutvortojn Esperante! La grupo poste ludis konatigajn ludojn dum horo sub grandega tendo kiu servis ankaŭ kiel koncertejo vespere. Dum la cetero de la vespero (kaj ĉiu malfrua vespero poste) estis du gravaj lokoj kiujn mi devis trovi. Unu estis facile trovebla pro la bruo, kaj tiu estis la diskoteko. Mi estas dancemulo, do mi tute ĝojis danci vespere en la diskoteko kun esperantistaj belulinoj! La alia grava loko estis la trinkejo kaŝita (pro nelaŭleĝeco) kie haveblis alkoholaĵoj, tiu bona konversacia

lubrikaĵo. Finfine mi endormiĝis.

Dum la sekvaj du tagoj mi aŭdis kelkajn prelegojn kaj partoprenis lecionojn kaj konversaciajn rondojn. Du plej interesaj por mi estis la improviz-teatra leciono kaj la gvidata diskuto pri beleco. Dum la improviz-teatraĵo la partoprenantoj povis sperti tiun ĉi teatron, kaj mi lernis ke eĉ malgraŭ ke niaj kulturoj estas tiel malsimilaj, ni homoj ankoraŭ mirakle similas. La sama temo evidentiĝis dum la konversacio, sed la etoso tie pli seriozis, ĉar ni diskutis kiel beleco influas niajn kulturojn kaj proprajn vivojn. Mirindis, laŭ mi, ke homoj el ĉiu mondparto povis paroli kune kaj tiel dividi ideojn.

Dum la vesperoj okazis koncertoj, filmoj, diskotekoj kaj multege da babilado. Esperanto Desperado ludis kion ili nomis kiel sian lastan koncerton, kaj vere ili rokis! La tuta tendego saltadis dance, ĉar tiu bando simple sciis kiel instigi la spektantaron. Mi spektis ankaŭ amuzan koncerton de la pola bando Hotel Zacisze kaj ĝuis ilian metalrokan stilon. La sola subtitolita filmo kiun mi spekt-

is dum la kongreso estis *Mia Najbaro Totoro*, kiu tute ĝueblis. Mi ne povas memori kiom kaj kun kiuj mi babilis, sed babilado okazis senĉese, kaj estis mia plej ŝatata sperto tie.

Malbonŝance, mi ne povis resti en Pollando dum la tuta kongreso, kaj per la helpo de miaj "filino" kaj "nepino" mi akiris taksion al la flughaveno tre-tre frue la trian de aŭgusto. Malfeliĉe, mi maltrafis la ekskursan tagon, la koncertojn de Krio de Morto kaj JoMo, la viziton de Malgorzata Handzlik, la Internacian Vesperon kaj la Komunan Fotadon, sed mi tute feliĉis ke mi povis pasigi almenaŭ iom da tempo kun tiom da bonkoraj homoj.

Sendube, la plej bona afero kiu okazis dum mia unua IJK estis la komenco de multaj amikecoj. Antaŭ la kongreso mi ne povis imagi la diversajn homojn kun kiuj mi amikiĝos, kaj nun mia mondo fariĝis pli granda kaj pli malgranda samtempe. La 61-a Internacia Junulara Kongreso en Zakopane, Pollando vere montris la personan valoron de Esperanto!



La lasta koncerto de Esperanto Desperado furoris



Dum IJK oni ĉiam renkontas interesajn homojn

Learn Esperanto – and Have Fun – at NASK 2006!

*The 37th North American Summer Esperanto Institute – July 3-21
Sponsored by the Esperanto League for North America and the Esperantic Studies
Foundation; School for International Training in Brattleboro, Vermont*

Ellen Eddy

NASK will be held for the fifth year at the School for International Training (SIT), a world famous venue for language and teacher training in Brattleboro, Vermont. The instructors have prepared programs of study that emphasize the active use of Esperanto in intercultural communication, understanding, and cooperation. The teachers include: Katalin Kovats (Hungary/Netherlands), Sylvain Lelarge (France/Netherlands) and Lee Miller (US). The cost for a three-credit course is \$1015. Housing in a shared room with three meals a day is \$700. Singles are \$820. Students will arrive on July 2nd and depart on July 22nd. Classes officially will be July 3rd through 21st.

Katalin Kovats will provide a unique language experience based on the life and art of

the painter Vincent van Gogh. While studying the fine points of grammar and improving both understanding and speaking abilities in Esperanto, the students will increase their vocabulary related to art, nature, philosophy and even illness, geography and astronomy (besides everyday subjects). Sylvain Lelarge will bring his talents using suggestopedia and other brain-friendly speaking activities which have made him a popular instructor around the world.

Up to date information about NASK (in English and Esperanto) can be found at <http://esperanto.org/nask/> On-line registration will be found in the spring at www.sit.edu/esperanto/index.html

ELNA/ESF Scholarships

Students and instructors can receive partial financial support for fees and housing.

Clubs and individuals are invited to recommend students for advanced studies. Interested students and teachers should write in Esperanto, giving their Esperanto histories (study, teaching, and club activities) to: Ellen M. Eddy at eddyellen@aol.com or 11736 Scott Creek Drive SW, Olympia WA 98512 USA, or telephone: 360-754-4563

Enrichment Opportunities

Various evening and weekend activities afford opportunities to informally explore many aspects of Esperanto language and culture. These may include study groups, games, group singing, cultural presentations, slide shows, movies, poetry readings, public speaking, intercultural discussions, picnics, and field trips. If you would like to propose a special-interest program, contact Ellen Eddy.

“ARE 2005 naskis neniujn kabeontojn”

Boris-Antoine Legault

Esperanta kulturo estas iasence miksaĵo de tradicioj kaj antaŭenirismo. Ĝi strebas al aktiva konservado de tiuj tradicioj kiuj formas la popolajn identecojn, kaj samtempe ĝi estas moderna ilo por kunkreadi buntan porpacan kulturon. Eble ne nur koincide, la ĉi-jara ARE-renkontiĝo bone spegulis tiun Esperantan plurflankecon.

La kutimaj interkonatiĝaj ludoj estis tradicia ekzemplo ankaŭ dum ARE. Kiel ĉiujare, tiuj vere ekigis la kunvenon, malstreĉigis la etoson kaj ebligis al ĉiuj konatiĝi kun pluraj partoprenantoj. Rilate novajn ARE-programerojn, menciendas la librocenzoj – ĉi-jara “Metz-Fleury”-a elpensado kiu interesis multajn homojn kaj cetere furorigis postan surlokvan vendadon de pluraj el la prezentitaj libroj. Alispecan ekvilibron oni trovis ankaŭ en la interesaj prelegoj pri la islanda “Sagao de Njal” (verkita antaŭ multaj jarcentoj), la zamenhofa reform-projekto, kaj la daŭre ekestanta tutmonda Esperanta kulturo. Sed plej agrabla por mi ĉi-jare estis la kultura

vespero, ĉiuj eroj de kiu estis tre profesie prezentitaj. Oni ĉerpis tradiciajn temojn el diversaj kulturoj (interalie hajko-verkado kaj kantado de kristanaj kantoj), sed ankaŭ modernajn temojn, ekzemple en “Gardu vin de ĉinologoj”, amuza teatra verko de kanada esperantistino. Eĉ la tre grava temo de malsaneca milito estis traktita same profunde kiel ankaŭ arte. Finfine, mi informu pri tiu sennoma sabatvespera ludo kiun ni kuntradukis Esperanten kaj kiu poste amuzadis nin ĝis la dua horo matene. He! Solidareca kunlaboro kaj kunĝuado de la laborrezultoj ankaŭ estas partoj de la Esperanta idearo, ĉu ne?

Unu semajnon antaŭ la ARE-renkontiĝo, mi (sensukcese) invitis kelkajn el la montrealaj Esperanto-komencantoj partopreni la Esperantistan semajnfinojn, kvankam mi mem estis ne tute konvinkita pri la taŭgeco inviti ilin. Mi dubis kaj timetis. Ĉu la loko estos oportuna? Ĉu la programeroj estos interesaj? Ĉu entute partoprenos iuj? Alivorte, ĉu tiu okazaĵo plifervorigus la novajn esperantemulojn, aŭ ĉu male ĝi estus ne nur ilia unua, sed ankaŭ lasta Esperanta renkontiĝo?.. Sed dum reira ve-

turado el Arĝenta Golfeto (Silver Bay) Montrealen, mi mordadis miajn fingrojn, bedaŭrante ke mi ne kvazaŭtrudis ĉiujn miajn Esperanto-amikojn en la semajnfinan Esperantujon. ARE 2005 naskis neniujn kabeontojn. Male, mi ja povas aserti ke nia aŭtuna renkontiĝo estis tre granda sukceso kaj vigligis la tutan regionan esperantistaron, ĝis almenaŭ ARE 2006!

Unue aperis en la bulteno de la Esperanto-Societo Kebekia *La Riverego*, decembro 2005 sub la titolo “Pri ARE 2005”

Anonce

Emeritiĝinta instruistino el Irano serĉas E-an familion en Kalifornio kiu havas tempon helpi min pri uzado de komputiloj kaj la interreto kiel konciza kurso en sia hejmo post TKEK en aprilo 2006. Mi pagos por la ĉambro kaj la manĝaĵoj. Mia adreso: Mosagh4@yahoo.com; 3915 American dr #131 Plano, TX.75075. Tel.: 972-985-9125

Raporto pri TTK-3

Robert L. Read

Sabaton, la 19-an de novembro, okazis la tria Tut-Teksasa Kongreso, en Aŭstino, Teksaso. Ĉirkaŭ 16 homoj partoprenis ekde la 9-a matene ĝis la noktomezo. Preskaŭ ĉiuj partoprenantoj estis el Aŭstino kaj Dalaso kaj ĝia ĉirkaŭaĵo.

La TTK-3, same kiel la unuaj du, havis malstreĉan horaron:

9:00 – babilado

11:30 – prezentaĵo de Rob Read pri Projekto Gutenberg

12:00 – tagmanĝo – Wheatsville Co-op

16:00 – *slam*-poezia konkurso

17:00 – kantado, babilado

18:00 – vespermanĝo: Mother's Vegetarian Restaurant


20:00 – spektado de la filmo *La Grandega Diktatoro (The Great Dictator)*

La tutan aferon ĝuis la partoprenantoj, sed la *slam*-stila poezikonkurso sukcesegis. Ĉi tiu estis la unua tia Esperanta prezentaĵo pri kiu ni aŭdis. La angla vorto *slam*, kiu signifas “forta bato” aŭ “brue fermi aŭ bati”, estas uzata por konkurso, kutime en trinkejo, en kiu multaj

poetoj konkuras per la zorge provdeklaritaj laŭparoloj de siaj originalaj poemoj. Kutime volontuloj el la aŭskultantaro juĝas la poemojn laŭ kiu ajn kriterio ili deziras. La juĝistoj skribas poentojn inter nul kaj dek por ĉiu poemo, kaj la poetoj kun la pli altaj poentoj gajnas aŭ konkuras en nova, malpli granda vico.

En nia konkurso, la legantoj de neoriginalaj poemoj konkuras unue. Du laŭlegintoj de tri poemoj konkurasis, kaj Phil Dorcas gajnis kontraŭ Todd Phillips. En la pli alta kategorio de originala poezio, kvar poetoj konkurasis per kvin poemoj. La poetoj estis Jarlo Bills (dufoje), Trejsi Huber, Anderson Mills kaj Rob Read. En nia konkurso, ni volis permesi juĝi al kiu ajn kiu volas tion fari. Do ĉiujkiuj ne konkurasis – juĝis. Eĉ du ne-jam-esperantistoj juĝis: laŭ la sono kaj la aspekto, sen la kompreno de la tuta signifo.

Mi honeste raportas ke la poezio estis tre,



Teksasaj esperantistoj

eĉ surprize, altkvalita. Feliĉe, ĝi estis ankaŭ diversa laŭ la temoj kaj stiloj. Mi prezentis kvinjambinan, rimantan poemon pri la morto de mia avino. Jarlo prezentis koleran, kor-krevigan poemon pri murdo de judoj. Anderson prezentis humuran, eĉ erotikan poemon pri ĉokoladmaniulo. Trejsi prezentis psikologian poemon pri virino kiu rajtas suspekti adulton. Jarlo ree prezentis alian belan poemon pri enamiĝo inter du diversrasaj (kaj diversgrandaj) junaj homoj. Anderson gajnis kontraŭ la forta aro de originala poezio kiu imponis al ĉiuj.

Report on the third TTK

Robert L. Read

Saturday the 19th of November the third All-Texas Esperanto Congress was held in Austin, Texas. About 16 persons participated from 9 in the morning until midnight. The participants were almost all from Austin or Dallas and its surrounding area.

The TTK-3, like the first two, had a relaxed schedule:

9:00 – chatting

11:30 – presentation by Rob Read about Esperanto in Project Gutenberg

12:00 – lunch: Wheatsville Co-op

16:00 – Slam-poetry contest

17:00 – Singing and chatting

18:00 – Dinner: Mother's Vegetarian Restaurant

20:00 – Viewing the film *The Great Dictator*

The whole affair was thoroughly enjoyable, but the slam-poetry contest was a great success. This was the first poetry slam in Esperanto of which we have heard. The English word “slam” is used to describe a poetry contest, generally held in a bar, in which many poets compete with well-practiced reading or performances of original poems. Usually, volunteers from the audience judge the poems, by whatever criteria they choose. The judges write down a score between zero and ten for each poem. The poet with the most points wins, or advances to the next, smaller round.

In our contests, the readers of non-original poems went first. Two readers of three

poems competed, and Phil Dorcas won against Todd Phillips. In the higher category of original poetry, four poets competed with five poems. The poets were Earl Bills (competing twice), Tracy Huber, Anderson Mills, and Rob Read. In our competition, we wanted to allow anyone to judge that wanted to. Therefore everyone who did not compete in a category judged, even two not-yet-Esperantists who judged on the basis of sound and sight, without full comprehension.

I can honestly report that the poetry was very, even surprisingly, high-quality. Fortunately, it also was diverse in subject and style. I presented a poem in rhymed, feminine iambic pentameter about the death of my grandmother. Earl presented an angry, heart-breaking poem about the murder of Jews. Anderson presented a humorous, even erotic, poem about a chocolate addict. Tracy presented a psychological poem about a woman who had reason to suspect adultery. Earl again presented a different, and very beautiful poem about interracial infatuation between two young persons of very different size. Anderson won against a strong field that impressed everyone.



Earl Bills

Junulinoj Ne Restas en Mankas – Ili Simple Ne la Movado...

En la pasinta numero de Esperanto USA (2005/2, 3, 4) aperis artikolo “Kie estas junaj usonaj esperantistinoj”. Kiam la revuo estis jam sendita al la presejo venis plia kontribuo al nia enketado, de Jakobo Schwartz. Ni volonte publikigas lian opinion ĉi-numere.

Jakobo Schwartz


Junuloj plejparte ne ĉeestas ELNA-kongresojn – tio estas pli grava problemo solvenda

– Kial malmultas en la usona E-movado junaj virinoj? Mi ne konsentas pri tio. Necesas kontroli la nombrojn por kompreni la ĝustan situacion: ĉu temas pri ĉiuj E-parolantoj, ĉu nur pri tiuj kiuj membras en ELNA, aŭ nur pri tiuj kiuj *aktivis* en ELNA?

Laŭ mi, estas multaj junaj virinoj. Ekzemple, la kongreson en Sal-lag-urbo, Utaho, organizis plejparte junulino kaj ŝia patrino. Entute estis kvin junulinoj (ankaŭ Elinjo Raible kaj Amanda Higley ĉeestis) kaj nur du aŭ tri junaj viroj (mi, Tim Westover kaj Ralph Craig). Do estis pli da junulinoj ol junuloj! Sed junuloj plejparte ne ĉeestas ELNA-kongresojn – tio estas pli grava problemo solvenda.

En la interretaj komunumoj mi vidas pli da junulinoj ol junuloj. En la komunumo ĉe LiveJournal estis antaŭe pli da junulinoj, sed ili ne restis en Esperantujo. Mi kredas ke mi vidas pli da junulinoj ĉe la interreta E-kurso Lernu! – kaj facilas kontroli tion ĉar oni registras tiajn informojn. Sed la problemo kiun mi vidas estas ke tiuj junulinoj ne restas en Esperantujo. Tion ni solvu. Mi vidas ke multaj homoj uzas Lernu!-n, sed ni ne vidas ilin en la usona Movado, do kio okazas? Ankaŭ tion ni pripensu. Mi volus ke ELNA proponu unu jaron da senpaga membreco al usonanoj kiuj finas kurson ĉe Lernu! (*Red. noto: Esperanto USA demandis al la administrantoj de Lernu.net pri la kvanto de la usonaj kursfinintoj. Laŭ Lernu, dum pli ol 3,5-jara ekzistoperiodo de la paĝaro (ekde aŭgusto 2002), 17% el ĉiuj registritaj uzantoj (694) estas usonanoj. Do, la tuta kvanto de usonaj kursfinintoj estas ĉ. 120 homoj, aŭ averaĝe ĉ. 35 kursfinintoj jare.*)

Kiam mi vizitis la kurson de Ed Williger



Partoprenantinoj de IJK 2005 en Zakopane, Pollando

ĉe Stanford, duono (aŭ pli) el la ĉeestantoj estis junulinoj.

Kiam mi ĉeestis la Esperanto-grupon ĉe NCSSM (lernejo en Nordkarolino), la ĉefa motoro estis studentino, kaj ĉiuj ĉeestantoj estis ŝiaj amikinoj kiuj ekinteresiĝis pri Esperanto pro ŝi kaj volis aliĝi kun ŝi al la grupo.

Mi kredas ke mi vidis foton de NOREK 2003 en kiu estis pli da virinoj ol viroj – sed mi forgesas ĉu temas pri junulinoj aŭ plenkreskuloj.

Kiam temas pri plenkreskuloj, ja ne mankas virinoj. Fakte, ŝajnas ke la plejparton de praktika laboro pri Esperanto faras la virinoj: Lusi Harmon okupiĝis pri la vidbend-kurso *Pasporto* (lastatempe kun multe da helpo de Diana Weichert); Ellen Eddy okupiĝas pri NASK; multege aktivis Dorothy Holland kaj antaŭe Cathy Schulze ktp. Tio ne signifas ke la viroj faras nenion (Tim Westover lastatempe progresigis la eldonadon de PMEG-on, kaj David Wolff la eldonadon de la libro de Richardson), sed la plejparton de laboroj ŝajne faras virinoj.

Se malsamaj homoj ne venas, provu reklami ekster la kutimaj rondoj

Sed revene al la demando, mi diru ke la E-Movado en Usono estas malgranda. Kaj aliaj homoj emas aliĝi al malgranda grupo nur se ili povas rilati al la jamaj homoj de la grupo. Se du strangaj viroj estas la nuna klubo, ĉu junulinoj emus aliĝi? Sed en la situacio ĉe NCSSM, unu junulino starigis grupon ĉar ŝiaj amikinoj ne hezitis aliĝi al ŝia grupo. Kaj tio povas klarigi ankaŭ la mankon de ne-blankuloj.

Sed mi diru denove ke oni esploru. Kiom da ne-blankuloj estus la “normo”? Mi konsentas ke ili ja mankas. Tamen, ni ne forgesu ke almenaŭ du estraranoj estas hispanlingvanoj, kaj nuntempe en San Diego ŝajnas ke estas aktivaj hispanparolantoj kiuj gvidas la E-grupon. Do, ĉu la kvanto de ne-blankuloj povas dependi je la loko de la lando? Ĉu vi atendus multe da ne-blankuloj en la klubo de Utaho, ekzemple?

La grupo en Novjorko aspektas sufiĉe diversa. Mi ne vidas multajn nigrulojn, sed estas multaj ne-blankuloj kaj multaj enmigrintoj. Sed, kiel kun junulinoj, povas esti ke komence ĉeestis blankuloj, kaj la komunumo pligrandiĝas nur laŭ rekta kontakto, kaj se ne estas bona intermikso de rasaj/etnaj rondoj, tiel ekster la jamaj rondoj oni ne allogas. Povas esti ankaŭ ke E-on oni vidas kiel aferon por homoj kun tro da libertempo, riĉuloj, kaj bedaŭrinde ekzistas rilato inter etno kaj lukso de libertempo en Usono.

Do oni povas provi reklami Esperanton ekster la propraj rondoj... tamen pli facilas reklami en la propra. Sed plejparte mi kredas ke la problemo estas ke malgranda grupo allogas homojn kiuj estas samaj. Nesamaj homoj malpli emas aliĝi al grupo se ili sentas sin fremdaj aŭ nekomfortaj.

Kion eblas praktike fari? Se venas homo, malsama de via grupo, eble vi strebu fari ĉion por sentigi lin/ŝin komforta, por ke tiu revenu al la sekvaj renkontiĝoj. Se malsamaj homoj ne venas, provu reklami ekster la kutimaj rondoj.

Southeastern Regional Esperanto Convention



The convention will be held in the beautiful mountains of northern Georgia

The Esperanto Society of Metro Atlanta (ESMA) will be holding a southeastern regional Esperanto convention and courses March 31 – April 2, 2006 (Friday evening through Sunday afternoon) at Unicoi State Park in the beautiful north Georgia mountains, near the ersatz-Alpine village Helen. Although we're calling it a "regional" convention, everyone is invited!

Although the exact program has yet to be determined, we are planning to hold beginner, intermediate and (possibly) advanced Esperanto courses (depending on the amount of interest for each). And there of course will be cultural programs and ample opportunities to enjoy the tranquil natural setting. Also, if you have suggestions for the program, or want to contribute to the program, please contact us!

Registration Fees:

Until January 31st – \$25

After January 31 – \$30

At the door – \$35

Lodging must be reserved by 31 January to get the group rate; see the web page or send email for details. The cost is \$79/night for two people.

For more information and for registration and other details, please contact Jim Henry at jimhenry@pobox.com; 770-300-0523; 4404 Mill Court, Duluth GA 30096.

The Esperanto Society of Metro Atlanta (ESMA): www.esperanto-atlanta.org

Esperanto Gravas por Gejunuloj

Beth Magallon

Multaj levitaj manoj de la gejunuloj montris ke ili deziras plustudi Esperanton. Mia koro saltetis. Kiel eblas ke en urbeto kiel Tahlequah, Oklahomo, tio povus okazi?

Tahlequah estas urbeto kun 14 mil loĝantoj en la nordorienta kvarono de la ŝtato Oklahomo, Usono. Fine de novembro, 2005, mi ricevis telefonvokon de raportisto, Judy Gibbs Robinson, kiu verkas por la ĵurnalo *The Oklahoman*, el Oklahom-urbo. Foje ŝi legis artikolon en dalasa ĵurnalo kiu informis pri diversaj lingvoj instruataj en Teksaso. Tiu artikolo sugestis ke la lingvoj kiujn studentoj lernas en la publikaj lernejoj spegulas la eksterlandan politikon de la registaro. Judy Gibbs Robinson decidis ke estus interese verki similan artikolon pri Oklahomo.

Do, ŝi kontaktis la Ŝtatan Ministerion pri Edukado de Oklahomo, kaj ili siavice gvidis ŝin al la Oklahoma Asocio de Instruistoj pri Fremdaj Lingvoj (*Oklahoma Foreign Language Teachers Association*, OFTLA). Dum la konversacio, la prezidanto de OFTLA, Suzanne Craig menciis ke instruistino en Tahlequah, Oklahomo, instruas Esperanton en gimnazio (*Tahlequah Junior High School*), kaj donis al ŝi mian nomon. Judy Gibbs Robinson intervjuis min telefone kaj aranĝis ke fotisto venu al la lernejo en Tahlequah (tio okazis la lastan tagon de novembro). Kaj jam la unuan de decembro, la raportisto mem venis al la lernejo por paroli kun la gelernantoj de la Esperantaj klasoj. (En Tahlequah mi instruas kaj nure Esperantajn klasojn, kaj ankaŭ klason nomatan "Esplorante Lingvojn" – *Exploring Languages*, en kiu mi instruas Esperanton kelkajn semajnojn kiel bazan lingvon por lerni iom da multaj diversaj lingvoj.)

Kiam venis la raportisto, la vic-estro de la lernejo vokis per interna komunikilo ĉiujn gelernantojn kiuj iam jam studis Esperanton kun sinjorino Magallon iri al ŝia klasĉambro, ĉar raportisto deziras paroli kun ili. Eble kvardek aŭ kvindek gelernantoj estis en la klasĉambro. La raportisto demandis al la gelernantoj diversajn demandojn kiel, ekz.: "Ĉu vi ŝatas Esperanton?", "Ĉu la studado de Esperanto helpas vin en viaj aliaj kursoj?", "Ĉu Esperanto vere estas pli facile lernebla ol aliaj lingvoj?", "Kial ĝi estas pli facila?", "Diru ion en Esperanto", "Kiel vi uzas ĝin?", "Kiel vi uzos ĝin en la estonteco?" kaj tiel plu.

Ŝi ankaŭ parolis iom pri tio kion ŝi jam lernis pri Esperanto, ekzemple, ke Esperanto ne rilatas al iu ajn registaro. Ŝi ridetis kiam la gelernantoj diris al ŝi ke Esperanto ne havas malregulajn verbojn, ke Esperanto estas skribita precize same kiel ĝi estas prononcata, ke ĝi havas nur 16 regulojn, kaj ke la reguloj ne havas esceptojn.

Ŝi iradis en la klasĉambro kun sia diktafono, surbendigis diversajn gelernantojn kaj skribis iliajn nomojn. Ŝi ankaŭ rigardis la porinfanajn librojn en Esperanto. La gelernantoj de la nuna klaso de "Esplorante Lingvojn" jam skribis surpapere siajn pensojn pri Esperanto, kaj la raportisto petis la permeson havi la paperojn por legi poste, kaj eble citi ilin en la artikolo.

Mi ankaŭ rakontis al la raportisto interesan sperton de la pasinta semajno: Phil Dorcas, la prezidanto de ELNA kaj de AAIE, vizitis Tahlequah. Sabaton vespere ni iris al loka *Burger King*. Kiam ni eniris la rapidmanĝejon, ni aŭdis junulan voĉon diri "Saluton, sinjorino Magallon, kiel vi fartas?" Tio estis mia ekslernanto Sjon, kiu laboras tie. Li studis Esperanton kun mi antaŭ unu aŭ du jaroj. Ni babilis iom. Kiam li havas tempon, li plustudas ĝin per lernu.net. Mi ankaŭ prezentis Sjon kaj Phil unu al la alia, kaj ambaŭ feliĉis aŭdi Esperanton. Judy Gibbs Robinson ridis pri tio ke ĉi tie en Tahlequah, Oklahomo, iun sabaton vespere en *Burger King* tio povus okazi.

Ĉe la fino de sia vizito, ŝi demandis al la gelernantoj: "Kiu ŝatus lerni Esperanton plu? Kiu ŝatus progresi en la lingvo?" Mi pensis, "Nun estas la momento de vero." Kiel normalaj lernantoj de ĉi tiu aĝo, kiam la lernantoj estas en klaso, ili ofte ne bone respondas al la instruado. Certe, kelkaj lernantoj jam respondis al la demandoj de la raportisto, kaj eble kelkaj gelernantoj levos la manojn. Mi timis la respondon. Sed jen, maro da manoj levitaj. Mia koro saltetis.

Tiu artikolo de Judy Gibbs Robinson aperos baldaŭ en la ĵurnalo *The Oklahoman*, en Oklahom-urbo. Kaj por mi kaj vi, kiu legas tiun artikolon, ne nur gravas ke la artikolo aperos en ĵurnalo, sed ankaŭ ke la gelernantoj mem kuraĝigas nin persisti en la instruado de Esperanto.

Dum la revuo estis kompostata:

La artikolo (tre pozitiva) kun la titolo "Tahlequah teacher tackles language of communication" de Judy Gibbs aperis en la ĵurnalo *The Oklahoman* la trian de januaro, 2006.

Esperanto Is Important for Young People

Beth Magallon

Many raised hands of young people demonstrated that they want to study Esperanto more. My heart skipped a beat. How is it possible that in a small town like Tahlequah, Oklahoma, this could occur?

Tahlequah is a town of about 14,000 people in the northeastern quarter of the state of Oklahoma. During the third week of November (2005), I received a telephone call from a reporter, Judy Gibbs Robinson, who writes for the newspaper, *The Oklahoman*, out of Oklahoma City.

She had read an article in a Dallas (Texas) newspaper, which informed the readers of the different languages taught in the state of Texas. That article suggested that the languages which students learn in the public schools reflect the foreign policy of the government. Judy Gibbs Robinson decided it would be interesting to write a similar article about the state of Oklahoma.

She contacted the Oklahoma Department of Education. They led her to the Oklahoma Foreign Language Teachers' Association (OFTLA). There, she spoke with Suzanne Craig, the President of OFTLA. During that conversation, Suzanne Craig mentioned that there is a teacher in Tahlequah, Oklahoma, who teaches Esperanto at the Tahlequah Junior High School, and she gave the reporter my name.

Judy Gibbs Robinson interviewed me by phone and arranged for a photographer to come to the school in Tahlequah. The photo session occurred the last day of November. December first, Judy Gibbs Robinson herself came to the school to visit with the students from the Esperanto class. (In Tahlequah, I teach classes dedicated exclusively to Esperanto, and I also teach another class named Exploring Languages. In that class I teach a few weeks of Esperanto as a base language for learning a little of many different languages.)

When the reporter arrived, the Vice-principal called over the intercom all students who had already studied Esperanto with Mrs. Magallon, to go to her room because a reporter wanted to talk with them. Possibly 40 or 50 students were in the classroom. The reporter asked the students different questions like: Do you like Esperanto? Does the study of Esperanto help you with your other classes? Is Esperanto really easier to learn than other

languages? Why is it easier? Say something in Esperanto! How do you use it now? How will you use it in the future? etc.

She also talked about what she had learned about Esperanto. For example: Esperanto is not connected to any specific government. She smiled when the students told her that Esperanto does not have irregular verbs, and Esperanto is written exactly as it is pronounced, and it has only 16 rules, and the rules have no exceptions.

She walked around in the room with her recorder, recording different students' comments. She wrote down the names of those she recorded. She looked at the children's books in Esperanto.


The students of the present class of Exploring Languages had already written out their thoughts about Esperanto. She asked if she could have the papers to read later, and possibly to quote in the article.

I told the reporter about an experience from the previous week: Phil Dorcas, the President of ELNA (Esperanto League for North America) and of AAIE (American Association of Teachers of Esperanto) was visiting Tahlequah. Saturday evening we went to the local Burger King. When we walked in, we heard a young man's voice say, "Saluton, sinjorino Magallon, kiel vi fartas?" (Hello Mrs. Magallon, how are you?). The young man working there was Sjon, an ex-student of mine. He studied Esperanto with me a couple of years ago. We chatted a bit. When he has time, he studies via lernu.net. I introduced Sjon and Mr. Dorcas to each other. They were both happy to hear Esperanto.

Judy Gibbs Robinson laughed, that here in Tahlequah, Oklahoma, some Saturday evening in Burger King, something like that could happen.

Close to the end of her visit, she asked the students, "Who would like to study more Esperanto? Who would like to progress in the language?" I thought, "Now was the moment of truth." As normal students of this age, when the students are in class, they often do not respond well to teaching. Of course, some students had responded to the reporter's questions, so maybe at least a few students would raise their hands. I was afraid of the response. But, what I saw was a sea of raised hands. My heart skipped a beat.

The article written by Judy Gibbs Robinson will appear soon in the newspaper *The Oklahoman*. But for me and for



Jacob Schwartz during the presentation of TEJO at the ELNA-convention in Austin, Texas

you who are reading this article, not only is it important that the article is being published in the newspaper, but that the students themselves give us courage to persist in the teaching of Esperanto.

The article (very positive) with the title "Tahlequah teacher tackles language of communication" by Judy Gibbs was published in the newspaper *The Oklahoman* the third of January, 2006.

TutKalifornia Esperanto-Konferenco

(TKEK) okazos de la 24-a ĝis la 26-a de marto, 2006, en Davis, Kalifornio en la Hallmark Inn. De vendredo vespere ĝis dimanĉo posttagmeze spertu kun ni varman etoson Esperantan. La programo enhavos ludojn, kantadon, deklamadon, recenzojn, prelegojn pri temoj teknikaj kaj neteknikaj, bankedon, aŭkcion, piknikon kaj ekskurson al vitejoj de la Universitato de Kalifornio. Aliĝkosto estas \$45 ĝis la 1-a de februaro, \$50 poste. Informo pri loĝado haveblas de la Hallmark Inn, 530-753-3600. Ĉambroj haveblos je speciala prezo de \$89 nokte, kiam vi mencias "Esperanto"-n. Petu pli da informo kaj aliĝilon de Henry Studer, 908 Villanova Dr, Davis, CA USA, hestuder@uc-davis.edu, 530-753-4906. <http://www.esperanto.org/esos/tkek/>

Jim Henry

Tri anoj de la Esperanto-Societo de Metropola Atlanto – Ĵenja Amis, Henri Spehar kaj Jim Henry – faris en novembro prezenton pri Esperanto al geografia klaso ĉe Peachtree Ridge High School en Suwanee, Georgio. (Temas pri “freshman AP Human Geography”, universitat-nivela kurso proponata al aparte inteligentaj kaj lernemaj lernejoj.)

Ni estis invititaj de certa lernejo, laŭ peto de la instruisto. La intereso al Esperanto elvokis artikolo pri Esperanto kaj nia loka grupo aperinta en la *Atlanta Journal-Constitution* pasintvintre kaj kiun legis la klaso.

Ni montris Esperanto-librojn kaj gazetojn kaj ĉefe respondis al demandoj de la lernejoj (kaj foje de la instruisto). Ni havis preleg-skemon, kiun ni unue eksekvis, sed plejparte simple respondis al

“Mi Amas Esperanton!”

la multaj bonaj demandoj kiujn la lernejoj proponis al ni. Ni komencis per demandoj al la lernejoj pri iliaj lingvaj kaj vojaĝaj spertoj, kaj kion ili jam scias pri Esperanto; post tio ni iomete parolis pri la lingva problemo, la kostoj de tradukado ktp., tiam pri Esperanto kaj ĝia kulturo.

Estis tre ĝuinda sperto kaj por ni kaj verŝajne por la lernejoj; ilia instruisto konigis nin poste al alia geografia-instruisto, kaj invitis nin reveni venontjare por paroli al pli

granda grupo (du klasoj kune). Fine ili prezentis kaj ni kunmanĝis kukon kun sukeraĵ-surskribo “Mi amas Esperanton”. Poste pluraj lernejoj ĉiĉeronis Henri-n kaj Ĵenja-n tra la gimnazio, ĉar ili antaŭe neniam vidis usonan gimnazion; mi (Jim) tiam revenis al la laborejo.



JENJA AMIS

ESMA-anoj en greka restoracio

Kiel Organizi Kongreson?

Parto II

Tio ĉi estas la dua parto de serio da artikoloj pri organizado de Esperanto-kongresoj, specife de landaj kongresoj de ELNA, sed ankaŭ de regionaj kongresoj. Ĝi baziĝas sur la kongresa manlibro de ELNA (la originalan gvidilon verkis Frank Helmuth, Cathy Schulze kaj Bill Harmon; Ellen Eddy reviziis ĝin. Jim Henry plu reviziis kaj multon aldonis), kiu troviĝas ĉe www.pobox.com/~jimhenry/esp/esma/planoj.htm.

Datoj kaj Daŭro

La kongreso (ĉi tie kaj poste sub “la kongreso” estas celata plejparte la “Landa Kongreso de ELNA – Red.”) ne konfliktu kun la Nordamerika Somera Kursaro (NASK), la Universala Kongreso (UK) de UEA aŭ la Internacia Junulara Kongreso (IJK). Se okazas Tutamerika Kongreso de Esperanto (TAKE) en tiu jaro, ĝi ne konfliktu ankaŭ kun ĝi. Se eblas, ĝi estu tuj antaŭ aŭ post iu alia kongreso, aŭ inter du, por ke homoj povu rekte vojaĝi de unu Esperanto-aranĝo al la alia. Tradicie la kongreso estis tuj antaŭ aŭ post NASK, do en julio. Sed post kiam NASK translokiĝis al Vermonto, ni ne plu povas scii ĝian daton sufiĉe frue por fari

lian precizan temp-aranĝon kaj ankaŭ anonci la kongreson tiel frue kiel ni volas fari. La kongreso prefere okazu post la fino de la lerneja jaro kaj antaŭ la komenco de la sekva (tamen tio multe varias de loko al loko). Lokaj kondiĉoj povas dikti ŝanĝojn de la datoj al alia periodo. En tre varma loko oni prefere aranĝu la kongreson pli frue: ekzemple, ni kongresis maje en Atlanto (2000) kaj Sallaga Urbo (2001).

La kongreso evitu la datojn de Pasko, Patrinoŝago, Patroŝago kaj Dankofesto, sed ĝi povas konvene esti en Sendependec-tago (4-a de julio) aŭ Memortago (lasta lundo de majo). Eblas ankaŭ Labortago (unua lundo de septembro), sed ni ankoraŭ ne uzis tiun daton. En la festotagaj semajnfinoj homoj ne devas uzi tiom da fleksaj feritagoj por veni; sed, aliflanke, povas esti konflikto kun aliaj gravaj aferoj kiuj ĉiam okazas en certaj festotagoj.

La kongreso kutime daŭras tri tagojn kaj iom pli: de ĵaŭdo vespere ĝis dimanĉo tagmeze, aŭ de vendredo vespere ĝis lundo tagmeze. La kongreso *fakte* komenciĝas per Interkona Vespero, sed *oficiale* ĝi komenciĝas per Solena Malfermo la sekvan matenon. Por ekzemplo ni diru ke la Interkona Vespero komenciĝas vendrede je la 19:00 kaj la Solena Malfermo okazas je

la 9:00 sabate. Tiam la tuttaga afer-kunsido de la ELNA-Estraro okazu de la 9:00 ĝis la 17:00 vendrede. La LKK demandu al la Estraro, ĉu ili volas ke tagmanĝo estu disponigita de la hotelo aŭ ĉu ili preferus iri al najbara restoracio. Se la unua, tio estu indikita en la hotelkontrakto.

La LKK povas laŭplaĉe plilongigi la kongreson per kurseto antaŭe aŭ ekskurso poste. Por daŭrigi la antaŭan ekzemplon, oni povas instrui kurseton ĵaŭdon kaj vendredon, kaj foriri por ekskurso baldaŭ post la Solena Fermo lunde, finante la ekskurson merkrede. Sed la ĉefa parto de la kongreso estu tri (aŭ eble kvar) tagoj por ne fortimigi homojn kiuj havas malmultajn feritagojn.

Ĝenerale la aranĝo vendredo-lundo pli taŭgas ol ĵaŭdo-dimanĉo; tiel la du plenaj tagoj de la kongreso estas semajnfinoj, kaj pli multe da samregionanoj povas partopreni sen uzi feritagojn. Sed apartaj kondiĉoj povas dikti la aranĝon ĵaŭdo-dimanĉo, ekzemple, en Kembriĝo en 2003, kiam NASK komenciĝis la lundon tuj post la kongreso.

Aprobo de la Estraro de ELNA

La Estraro de la Esperanto Ligo por Norda Ameriko findecidas pri la datoj kaj

loko de la jara kongreso. Tiu ĉi decido devus esti farita ne pli malfrue ol ok monatojn antaŭ la kongreso. (Ĝi ofte estas pli malfrua, sed tio kaŭzas problemojn por la Centra Oficejo [CO] – kaj por la LKK! – do ni faru pli frue se eblas.) La unua propono povas esti nur urbo kaj proksimuma dato. Tion la estraro verŝajne aprobas se la urbo ne estas sub milita leĝo kaj se la dato ne konflikta kun aliaj gravaj eventoj. Por oficiala propono kaj fina decido, devas esti buĝeto, do konkreta kongresejo, precizaj datoj kaj provizora hotel-kontrakto.

Tiu decido prefere estu farita plenan jaron antaŭe (aŭ eĉ pli), por ke oni maksimume reklamu la kongreson jam dum la antaŭa jarkongreso. Do, la buĝeton kaj proponan hotelkontrakton oni prefere donu al la Estraro dum aŭ antaŭ ilia tagkunsido en la antaŭjara kongreso; ili aprobas ilin, se ĉio bonas, kaj faksos la akcepton al la koncerna hotelo aŭ universitato. Tio estas idealo malofte atingita. Tamen, se LKK jam laboras pri trovo de kongresejo (aŭ eĉ jam trovis tion kaj nun negocas la kontrakton), ili reklamu iliajn planojn dum la antaŭa jarkongreso, eĉ sen estrara aprobo, sed ili klare diru ke estas ankoraŭ propono ne aprobata.

Financoj

Post aprobo de la kongresloko flanke de ELNA, la Loka Kongresa Komitato (LKK) sendas al la Centra Oficejo buĝeton kun sufiĉe ĝusta kalkulado de ĉiuj kostoj, kune kun detaloj de la planado. El tiu ĉi antaŭkalkulo ELNA determinos la kongres-kotizojn por la aliĝilo. La aliĝilo* estas kutime sendata al membroj kun la ELNA-organo *Esperanto USA*, ne pli malfrue ol la novembra-decembra numero, aŭ kun la membro-realiĝilo kaj abonilo. La CO faru, se haveblas mono, duan dissendadon en marto de la kongresjaro. La Centra Oficejo kaj la Kasisto starigos specialan konton por la kongreskotizoj kaj prizorgos ĉiujn financajn aferojn rilate la kongreson. La kongreskotizoj estu je nivelo el kiu estu neniom da malprofito por ELNA. Estas grave ke la raporto de la LKK rilate la kostojn estu kiel eble plej preciza. Se estos profito, la loka grupo ricevos 10% de ĝi.

La kostojn oni dividu en du partojn:


- 1) fiksaj kostoj kiuj estos samaj kiom ajn da homoj aliĝos kaj ĉeestos
- 2) po-kongresanaj kostoj kiuj varias laŭ la nombro de aliĝantoj kaj ĉeestantoj

La buĝeto indiku tiujn partojn bone. La

